

# Esperanto kaj UN

## Informilo de la oficejo de UEA por rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj

Numero 80, januaro-februaro 2026



Universala Esperanto-Asocio

### Universala Esperanto-Asocio elpaŝas pri homaj rajtoj

Dum momento de internacia streĉiteco, kiam tutmonda kunlaborado kaj tutmondaj valoroj estas sub daŭra minaco, Universala Esperanto-Asocio, kies membroj troviĝas en ĉiuj partoj de la mondo, kaptis la okazon de Internacia Homrajta Tago, la 10-an de decembro, por elpaŝi pri la bezono de internaciaj respekto kaj kompreniĝo. Ĝi notis, en mesaĝo adresita al Unuiĝintaj Nacioj, ke homaj rajtoj estas enskribitaj en la Statuton de UEA jam de la elformulado kaj aprobo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj.

Laŭ la Statuto de UEA, “Bonaj internaciaj rilatoj kaj la respekto de la homaj rajtoj, tiaj, kiaj ili estas difinitaj en la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj kaj aliaj internacie rekonataj instrumentoj, estas por la laboro de UEA esencaj kondiĉoj.”

En mesaĝo adresita al Unuiĝintaj Nacioj okaze de la Internacia Tago de Homaj Rajtoj, UEA alvokis al UN, ke ĝi “firme defendu la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj kaj daŭre laboru por ĝia plena realigo.”

“La ideo de homaj rajtoj estas la plej potenca kaj kapabla rimedo por gvidi nin al realaĵo kie ĉiuj homoj estas respektataj kaj povas realigi komunajn kaj personajn vivprojektojn. Tial, ni daŭre kaj kolektive reasertas, kiel aperas en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, nian firman kredon je la digno kaj valoro de la homa personeco kaj je la egalaj rajtoj de homoj, ‘sendepende de raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politika aŭ alia opinio, nacia aŭ socia deveno, posedaĵoj, naskiĝo aŭ alia stato.”

La mesaĝo citas la Altan Komisionestron de UN por Homaj Rajtoj, s-ro Volker Türk, kiu deklaris: “Ni devas rekuniĝi kun homaj rajtoj, rememorante, ke temas pri homoj -- pri iliaj bezonoj, deziroj kaj timoj, same pri iliaj esperoj kaj aspiroj.”

Laŭ la potenca mesaĝo de UEA, “Homaj rajtoj estas en la manĝaĵo kiun ni manĝas, en la aero kiun ni spiras, en la vortoj kiujn ni parolas, en la eblecoj kiujn ni realigas, kaj en la protektoj kiuj tenas nin sekuraj. Ili estas la komuna grundo, kiu unuigas nin en diverseco, la fundamento de nia vivo, kaj gvidilo por decidoj koncerne nin ĉiujn.”

La mesaĝo aparte atentigas pri lingvaj homaj rajtoj, “ĝuste ĉar temas pri ĉiutaga afero, ekde plej intimaj konversacioj ĝis publika debato. Ni laboru kontraŭ lingva diskriminacio. Ĉiuj rajtas partopreni en lingvaj komunumoj, uzi, protekti kaj antaŭenigi siajn lingvojn. Same, ĉiuj rajtas esti plurlingvaj kaj interparoli kun pluraj lingvaj komunumoj.”

La mesaĝo finiĝas per specifa apelacio al la miloj da Esperanto-parolantoj tra la mondo: “Universala Esperanto-Asocio instigas parolantojn kaj subtenantojn de la Internacia Lingvo Esperanto ĉirkaŭ la mondo al respekto kaj agado por homaj rajtoj, al solidareco, interkompreno kaj estimo por aliaj

popoloj. Ni, homoj, komunumoj, popoloj, movadoj kaj nacioj, unuiĝu por homaj rajtoj, justeco kaj egaleco – kaj ni instigu niajn registarojn, opinigvidantojn kaj ordinarajn homojn samon fari.”

## UEA funebras la forpason de ĵurnalisto kaj Esperanto-gvidanto Roman Dobrzyński

Kun profunda bedaŭro, UEA informas pri la forpaso de Roman Dobrzyński (1937-2025) la 13-an de novembro 2025 en la aĝo de 88 jaroj en Varsovio, Pollando. Li estis delonge Honora Membro de UEA pro sia longdaŭra agado en la pola kaj internacia Esperanto-movadoj kaj siaj gravaj kontribuoj al kulturo kiel ĵurnalisto kaj verkisto.



Naskiĝinte en Varsovio en novembro 1937, li eklernis Esperanton en 1955 kaj baldaŭ engaĝiĝis en la pola junulara Esperanto-movado. Li magistriĝis pri juro kaj ĵurnalismo en la Universitato de Varsovio kaj komencis karieron en Pola Televido, produktante pli ol 200 dokumentariojn kaj intervjuojn, kun speciala interesiĝo pri internaciaj aferoj, precipe per komisioj en Latinameriko. Lerta praktikanto de la arto de diplomatio, li prezidis la organizan komitaton de la 72-a Universala Kongreso de Esperanto en 1987,

kiu, en momento de politika kaj socia malfermiĝo, allogis pli ol 6000 esperantistojn el ĉirkaŭ la mondo, la plej granda kunveno de parolantoj de la lingvo en la tuta historio de Esperanto.

Dobrzyński estis aŭtoro de pluraj libroj, inkluzive de *La Zamenhof-strato* (2003), serio da konversacioj kun la arkitekto kaj inĝeniero Louis-Christophe Zaleski-Zamenhof, nepo de la fondinto de Esperanto, Ludoviko Zamenhof. Tradukite en ĉ. 15 lingvojn, la libro estis aperonta en angla traduko kiam Dobrzyński forpasis. Tradukis ĝin Humphrey Tonkin, kiu estis prezidanto de Universala Esperanto-Asocio dum la periodo de la Universala Kongreso de 1987. Oni nun antaŭvidas publikigon en januaro 2026.

Dobrzyński rolis kiel prezidanto de Pola Esperanto-Asocio en la 1980aj jaroj, kaj redaktis, tra la jaroj, plurajn Esperanto-gazetojn, inkluzive de *Pola Esperantisto*, organo de la Pola Esperanto-Asocio, kaj la junulara Esperanto-gazeto *Kontakto*. Kune kun Roman Malinowski, prezidanto de la Pola Parlamento kaj ŝlosila figuro en la unua postkomunista pola registaro, li starigis la Fondumon Zamenhof en Białystok, naskiĝloko de la kreinto de Esperanto. La Fondumo rolas kiel internacia kultura centro kaj monumento al Ludoviko Zamenhof.

## Esperantistaj instruistoj kongresos en Ĉinio

En 2026 la Kongreso de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) okazos ĉe Zaozhuang-a Universitato, en Ŝandong-Provinco de Ĉinio, de la 10-a ĝis la 16-a de julio, laŭ lastatempa anonco. . La Universitato estas sidejo de la plej granda Esperanto-Muzeo de Azio kaj de la sola Esperanto-fako pri Esperanto-studoj nuntempe aktiva kaj oficiale agnoskata de la Ĉina Registaro. Oni antaŭvidas, ke la kongreso allogos Esperanto-instruistojn el la tuta mondo. La temo de la Kongreso estos "Eduki profesiajn esperantistojn kaj protekti Esperanto-kulturon". Kiel parto de la kongreso, lingvistika simpozio science ekzamenos la temon "Plialtigi

lingvan konscion", tre gravan en tempoj de A.I. La finaj tagoj de la kongreso fokusiĝos je la kulturo kaj historio de la provinco Ŝandong, hejmloko de famaj filozofoj kiel Konfuceo kaj Mozi.

## Universala Esperanto-Asocio kaj Monda Brajla Tago 2026



**La 4-a de januaro** estas la Monda Tago de Brajlo. Deklarite de la Ĝenerala Asembleo de UN en 2018, la Monda Brajla Tago festas la vivon de Louis Braille (1809-1852), franca edukisto kaj inventinto de tuŝa lega kaj skriba sistemo kiu portas lian nomon, kaj kiu estis kreita por uzo de blinduloj. Li unue prezentis la sistemon al siaj kamaradoj en 1824, kiam li estis dekkvinjara.

La Internacia Lingvo Esperanto estis fondita en 1887. Jam en 1904, Profesoro Théophile Cart, kunlabore kun la blindula lernejo en Lausanne, Svislando, adaptis brajlon por uzo kun Esperanto, kaj, jam tiel frue kiel la komenco de mondaj Esperanto-kongresoj en 1905, blinduloj ludas signifan rolon en la disvastigo kaj uzado de la Internacia Lingvo Esperanto, organizante kongresojn kaj konferencojn en ĉiuj partoj de la mondo kaj ĉeestante Universalajn Kongresojn de Esperanto.

La Disvastiga Grupo de Esperanto (DGE), estas organizo kiu laboras ene de la blindula komunumo en Japanio. Nuntempe ĝi festas novan libron pri Louis Braille en Esperanto de esperantistino Kozawa Mami. DGE estis inspirita de la Monda Brajla Tago por daŭrigi sian laboron inter blindaj esperantistoj kaj engaĝi Universalan Esperanto-Asociacion en rekono de tiu ĉi grava tago de UN.

---

Oficejo por rilatoj kun UN, Universala Esperanto-Asocio, 777 United Nations Plaza, New York, NY 10017. [1] 212-687-7041. [www.esperantoporun.org](http://www.esperantoporun.org).